

HISPANA ESPERANTO

Ilustrita ĉiumonata gazeto, por la propagando de Esperanto kaj diskonigo de la Historio, Arto, Literaturo, folkloro kaj naturaj belaĵoj, de nia lando.—Redakcio: JACA, provinco de Huesca.—Julio Mangada Rosenörn

III^a
JARO

NUM. VI. — JUNIO

III^a
JARO



Kapitelo reprezentanta la Naskiĝon de Jesuo.

LA POEZIO DE LA HISPANAJ ARABOJ KAJ ĜIA INFLUO EN LA KRISTAN-HISPANAN KAJ EN TIUJN DE ALIAJ SUDAJ POPOLOJ (1)

I

Oni parolos antologie koncize pri la disvolviĝado de la poezio ĉe la araba Hispanujo.

Abul-Abbas venkis en Oriento la *Omiadojn*, kaj li ordonis ekstermi ilin; sed iu el la forkurintaj venkitoj, vokite de la andaluziaj maŭroj, la princo *Abderrahaman*, venis al Hispanujo, starigante sendependan tronon en Kordobo. La talenta kaj klera princo vekis entuziasmon kaj emojn al la poezio kaj kulturo, kaj jen kial ĝermis kaj fruktiĝis la poezio, la filozofio kaj la sciencoj en Kordobo, kiu fariĝis tiel sola eŭropa fokuso de granda civilizacio dum ses jarcentoj; kaj tiagrade, tiel delikate, entuziasme perfekte kulturis la poezion tiom da multenombraj personoj, ke, laŭ grafo Schak, «la listo el andaluziaj araboj poetoj formus serion el volumoj laŭ granda formato».

Al-Hola diras, ke, ĉe la palaco de *Abderrahaman*, oni okazigadis festojn pri literaturo, dum kiuj la ĉeestantoj recitadis versaĵojn, kaj ke eĉ la reĝo mem verkis versaĵojn. La reĝo semis palmsemon, kiun oni alportis al li de Oriento, kaj palmo naskiĝis kaj kreskadis, kaj la palmo inspiris lin por verki versaĵon el kiu jen fragmento:

«Tú también eres, joh, palmal,
en este suelo extranjera.
Llora, pues: mas siendo muda,
¿cómo has de llorar mis penas?
Tú no sientes, cual yo siento,
el martirio de la ausencia.
Si tú pudieras sentir,
amargo llanto vertieras.»

.....

(Hispana traduko.)

(1) Vidu «La grafo de Schak», sur paĝo 7.^a de la n-ro. de februaro de 1928 de ĉi revuo.

«Ankaŭ estas ci, ho, palmo!
fremda en ĉi tiu tero.

Ploru, do: sed ci, ja muta,
kiel plendi pro l' ĉagreno?

Ci ne sentas, kiel mi
martirigon de l' foresto.

Se ci povus tiel senti,
ci maldolĉajn larmojn verŝos.»

.....

Dum la araba unuiĝo en Hispanujo, dum la Kalifato, la reĝoj havis ĉe la kortego poetojn, kiujn la reĝo salajrigis, rekompencis kaj honoris, speciale plej eminentajn: kiel *Ybn-Abd-Bebbhi*, je la tempo de *Abderrahaman III^a*; *Ybn-Derradsch*, *Yusufar-Ramadi* kaj *Said*, je la tempo de *Almansur*.

Kiam la Kalifato disiĝis kaj multenombraj regnoj stariĝis, ne dekadencas la poezio, kiu akiras altvaloran gradon en Seviljo dum la regado de la reĝo kaj rimarkindega poeto *Al-Motamid*.

Kun la celo helpi la hispanajn arabojn, venis al Hispanujo la *Almoravidoj*, kaj kvankam *Yusuf* venkis la kristanojn, ankaŭ li submetigis poste la arabajn reĝojn, kaŭzante la dekadencan de la poezio, ĉar la fanatikeco de la venkintoj anstataŭis la harmoniajn kantojn de la poetoj per la monotona pastraj psalmoj kaj per la bruoj de la sabroj, laŭ *Dozy*: la toleremo fariĝis fanatikeco; la klereco, superstiĉo, ĉar la *Almoravidoj* estis *Berberoj*, fremdaj je la arabaj eleganteco kaj scio; sed ilia regado ne estis sufiĉe longedaŭra por estingi la civilizacion, kiu tiel profunde enradikiĝis en Hispanujo, laŭ opinio de grafo *Schak*; kaj laŭ tiu de la klera arabemulo *Julián Ribera Tarragó*, precize dum ilia regado «floris en la araba Hispanujo la populara poezio, formo plej bonega el ĉiuj de la ceteraj popoloj de la mondo» rimarkigante, kiel pruvon, la kantan de *Abencuzman*, kaj eĉ samtempe briladis en Andaluzio granda aro el plej eminentaj filozofoj de Eŭropo: *Avenzoar*, *Avenpace*, *Aventofail*, k. c., el kiuj *Avenpace*, naskiĝinte en Zaragozo je la fino de la XI^a jarcento, jam verkis je 1118 tekstojn pri Logiko, estante la unua hispana filozofo elĉerpanta frukton el la verkoj de la arabaj orientaj filozofoj kaj kulturiganta la Filozofion kun plena sukce-

so, kiel atestas liaj ĉefaj verkoj, kiuj estas ĉe la Biblioteko de l' *Escorial*, kaj «La Adiaŭanta letero» («*Reselatal Gadeh*»), kiun hebree tradukis *Juda-Ben-Vives* je la komenco de la XIV^a jarcento, kaj kiu estas en la nacia pariza Biblioteko, per kiu oni konstatas, ke *Avenpace* jam starigis la doktrinon pri *anima unuiĝo* aŭ *sola animo*. Ĉi tiuj grandaj filozofoj estis antaŭuloj de la tutmondfama *Averroes*, spertega kuracisto, genia poeto kaj klerega filozofo disvastiganta la aristotelan doktrinon kaj fondanta la *Averroismon*.

Poste, sub regado de la *Almohadoj* kaj *Benimerinoj*, la poezio atingis grandan disvolviĝon, kaj nur ĝi ekdekadencis je la fino de la mahometa regado, ĉar la perdo de la plej belaj kaj riĉaj urboj estis kvazaŭ terura frapo por la liriko de tiu razo el poetoj. Forpelite el Hispanujo kaj rifuĝinte en Maroko kaj Alĝerio, ĉi tiu popolo falis en tutplenan nescion.


Pri la karaktero, teknika formo kaj literaturaj specoj de la hispan-araba poezio, estas konstatite: ke la karaktero estis super ĉio lirika kaj subjektiva, ĉar la araboj kantas la feliĉajn aŭ malfeliĉajn okazintaĵojn, la naturon, k. t. p., nur laŭ siaj sentoj, deflankigante aŭ neatentante la priskribantan parton. Ĉi tio ne signifas, tamen, ke la hispanaj araboj ne estu sciintaj absolute la epopean poezion, ĉar estas konataj multaj poezioj tiaj; sed la hispanaj araboj ne produktis iun eposon, ili miksis fojojn, kiel en ĉiuj poezioj, epopean kaj lirikan-karakterojn. Ili ne konis la dramatan poezion, tial la eminentega *Averroes*, per sia «Parafrazo de la Aristotela Poetiko», difinas la tragedion arto por laŭdi, kaj la komedion arto por cenzuri.

Afektaj kaj strangaj eĉ groteskaj bildoj karakterizas la araban poezion same, kiel ankaŭ tre beligita kaj ampleksa esprimmaniero aŭ parolturno kaj superregeco de la teknika parto, tiagrade, ke *Schak* opinias: «ili antaŭ ĉio estis lertaj kaj subtilaj gramatikistoj, kaj la meriton de iliaj verkoj oni taksis pli kaŭze de la metrika kaj filologia kombino, ol kaŭze de la poetika energio». Jen kial por ni ĉi tiuj versaĵoj estas senspritaĵo kvankam artifike belaj.

Je la unuaj tempoj, serĉante la klasikismon, oni imitis la *Mualakat* kaj *Hamara*, konsiderante ĉi tiujn modeloj, priskribante laŭ necese la dezerton kaj kantojn al herooj kaj lokoj orientaj; sed baldaŭ la temoj pri ĉiaj okazintaĵoj en Hispanujo

kaj pri la beleco de la hispana lando influis la *Kasidas* (versaĵojn) de la poetoj.

Je la IX^a jarcento oni elpensis versaĵon, kiun *Schak* nomas *nuvasĉaja* (*nuvasĉaha*), kiu populariĝis, kaj la plej famaj poetoj por ĉi tiu versfarado estis *Ybn-Abd-Rebbihi*, *Ybn-Zohr* kaj *Ybn-Baki*. Sed la plej populara versformo naskiĝis, laŭ estas dirite, dum la epoko de la *Almoravidoj* kaj kiun Ribera alnomis *zegel* (*zeĥel*), kaj *Schak zadschal* (*zadsĉal*). La lingvo de ĉi tiuj versaĵoj estis la vulgara strata lingvo kvazaŭ ĵargono, kaj oni verkis ilin por esti kantataj antaŭ la publiko ĉe la stratoj kaj plaĉoj, ĉar *zegel* arabe signifas «kanton aŭ baladon kantatan plenvoĉe» kaj kiuj enhavis du apudmetitajn aferojn aŭ temojn por ĉiu el la du partoj de la versaĵo: la unua parto, kiun *Abencuzman* alnomas *tagazol*, celis altiri la publikan atenton per spritaj bakusaj aŭ erotikaj temoj; la dua, kiun ankaŭ *Abencuzman* alnomis *macih*, celis la ĉefan aferon por laŭdi personon, al kiu oni dediĉis la versaĵon per lastaj strofoj, kiuj estis vere la dediĉaĵo aŭ *endresa*. Sen la unua parto, la publiko — laŭ Ribera — ne estus tolerinta aŭ aŭskultinta pacienceme nuran laudkanton.



POPOLAJ KANTOJ

La popola kanto estas la esprimo de la homa sento kiel ideo kaj emocio samtempe, kaj ĝiaj versaĵoj kaj muziko vidigas ĉion plej profundan kaj sanan de la esenco de popolo. La emocio estas la animo de la popola kanto, ĉar atentu, ke, kiam emocio tute regas nin, niaj diroj estas kvazaŭ kanto; kaj la lirikeco de la popola kanto estas kiel eble plej granda spiritaltiĝo vidiganta la popolan psikologion. La popolaj kantoj, do, estas kvazaŭ floraro de la anima kampo en kiu radias kaj belvidiĝas la plej delikataj specimenoj el belaj kaj superegaj sentoj; tial estas altŝatata kaj ĉiamdaŭra emocio plezuriganta la kono pri tiuj popolkantoj, kiuj allogas kaj ravas la korojn. Ni, esperantistoj, kvazaŭ nelacigeble laboremaj abeloj, per la fortaj fidindajflugiloj de l' Esperanto, povas flugadi por delikate gustumi la riĉan pole non de l' popolaj sentoj, kaj per ĉi tiu ni povos fabriki al ni la plej bongustan el la mieloj: la SENTON PRI PACO, AMO

kaj RESPEKTEMO RECIPROCAJ INTER ĈIUJ HOMOJ. Ni, tial, diskonigu la popolajn kantojn.

Kanto de la barktrenistoj de l' Volgo.

Ĉi tiu kanto estas tre malnova kaj malgaja kaj ĝin kantis la malfeliĉuloj, kiuj trenis la barkojn en la riverego Volgo. La kanto aludas per sia sola strofo, kiun mi konas, prapatran kutimon por plekti la branĉojn de betulo dum ripoztempo aŭ dum festtago, laŭ signo de plena ripozo kaj libereco, malfarante la plektitaĵon je la laborrekomenco; sendube la malfeliĉuloj, plektante la betulajn branĉojn, koncernis sian servuton, kaj, malplektante ilin, sian sopiratan liberecon. La kanto vidigas la malrapidan paŝadon, sur la bordoj de la granda rusa rivero, de la malfeliĉuloj trenantaj la barkojn, unuigante per la takto dolora sed majesta la trenforton ĉies, opigante forton kaj sopiron ĝeneralajn; la kanto sentigas la penadon kaj la sopiron. Belega, emociiga kanto trafanta la plej profundan senton, kiu inspiris min por verki la jenajn strofojn, el kiuj la unua estas kvazaŭ traduko:

I

Ho, ve! Jam... Ho, ve! Jam
vi malfaru, ve dolor'!...
Ho, ve! Jam... Ho, ve! Jam
la branĉplektitaĵon, for
plektitaĵon de l' betul'
foli plena. Ho, ve, mizerul'!
Nepre, jes, nepre, nepre mizerul'!
Nepre, nepre, mizerul'!

II

Nun, ho ve!... Nun, ho ve!
jen laciĝa la labor'...
Nun, ho ve!... Nun, ho ve!,
tre dolora por la kor',
ĉar en Volga la spegul',
la branĉplektitaĵon de l' betul',
nune ne plu ja vidas mizerul';
jam ne vidas mizerul'!

III

Jen, ho ve!... Jen, ho ve!,
de l' betulo for la rav'...
Jen, ho ve!... Jen, ho ve!,
tre mizera mi, la sklav'!
Jen labora la terur':
treni pene barkon per la ŝnur'
ĉiam, jes, nepre treni sen murmur',
nepre treni sen murmur'!

IV

Nu, ho ve!... Nu, ho ve!;
jen de l' vivo la mizer'...
Jes, ho ve!... Jes, ho ve!,
la plej granda sur la ter';
ĉar jen homo kiel brut',
de la vivo, oh ve!, dum la tut';
certe, jes, certe, certe dum servut',
certe certe dum servut'!

V

Ho ve, kor'!... Ho ve, kor'!
Pro laciga mia pen'...
Ho ve, kor'!... Ho ve, kor'!
jen profunda la ĉagren'!
De la koro, dum la tir',
silentiĝas tute ĝia dir',
jen nur por liberiĝo la sopir'
de mizera la martir'!

Julio Mangada Rosenörn.

PRI MITOLOGIO

Koni Mitologion estas tre interese, ĉar tiu kono tre bone instruas, pro kio, de vidpunkto tute neŭtrala, ni sinsekve pri-traktos ĝin.



Antikva Monahejo San Juan de la Peña (Huesca).

ĤAOSO

Ĥaoso estas origino de sanktaj libroj kaj de mitologiaj fabeloj; laŭ mitologiistoj, ĝi estas Dio, kies posteno estis apartigi materiajn elementojn de la Universo, kiam la elementoj estis formantaj konfuzan amason.

Ovidio, per belegaj versoj, diras, ke Dio aŭ la Naturo, nekreinte ion, apartigis la elementojn... Inter la antikvuloj, la Naturo, kiun ili nomis *Agens-Agentis*, estis kvazaŭ universala ministro de la kreanta *Ĉiompovulo*; tial *Ovidio* ne donas al ĝi kreantan kapablecon, nur li donas al ĝi kapablon por reguligi la kreitaĵojn.

Primitive oni nomis *Ĥaoson Ofiono*, kaj oni reprezentas lin je la momento kiam li apartigas la elementojn ĉe ardanta lumfokuso, kies radioj disigas la ĉirkaŭantajn densajn ombrojn, kiuj aperas ĉe la fundo. Iu aldonas al tiu alegorio fragmenton de l' Zodiaco kaj kelkajn astrojn, por montri, ke post la laboro de *Ofiono*, la ĉiela arkaĵo fariĝis sidejo de steloj.

Laŭ la greka *Theodotion*, en la internaĵo de la tero loĝis *Ĥaoso*—personiĝo—kun *Eterno* kaj *Demomorgono* (kunmetita nomo el *daimon*-genio, demono-kaj *gorgos*-terkulturanto), kiu estis malpurega maljunulo, kovrita de musko, kaj kiu senpacience suferis pro absoluta neagado. Iam, laca pro enuiganta mallaboremo, li faris el nekonata substanco bulon; li saltis sur la bulon, kiun li ruligis en la spacon, tiel ĉirkaŭirante la teron, kaj tial kaj tiel li formis la ĉielon; li naskis *Uranuson*, kiu personigas lin, kaj preterpasante la montojn *Aeroceraŭneoj* (montoj *vunditaj de la fulmo* estas la signifo, eble vulkanoj, kaj la fantazio aŭ imago atribuis internan fajron de tiuj masoj al fulmo), el ĉi tiuj *Demomorgono* prenis fajran materion kaj, ĵetante ĝin en la ĉielon, li kreis la *Sunon*, kiu siavice naskis la *Nokton*.

Laŭ iuj, *Ĥaoso*, pro akraj doloroj, malfermis sian bruston kaj el ĝi eliris *Malpacon*, *Panuson* (Pan'), la tri *Parkusojn*, aŭ *Mortojn*, *Uranuson* aŭ *Ĉielon*, *Teron* kaj fine *Erebon* kaj *Nokton*, el kiuj naskiĝis multenombra posteularo kaŭze de senmoralaj kunpariĝoj.

URANUSO KAJ TITEO

Uranuso estis heredanta aŭ uzurpanta la superan rangon en la *Universo*, kaj reale de li devenas la ceteraj dioj de Grekujo,


Lia edzino estis *Tero*, kiun tiam oni nomis *Titeo*. De tiuj geedzoj naskiĝis la *Titanoj*, kiuj estis: *Titano*, *Saturno* ankaŭ nomata *Kronuso* (Kronos) kaj *Oceano*, *Kreio* aŭ *Krioso*, *Ceoso* kaj *Hiperiono*, kiujn oni konsideris grandaj *Titanoj*; la jenaj virinoj: *Thio*, *Rheo* aŭ *Cibeleso*, *Heribeo*, *Temiso*, *Mnemosino*, *Febeo* kaj *Tetiso*; la *Ciklopoj Bronto*, *Esteropo* kaj *Argeso* aŭ *Harpeso*, fine, la *Centimanoj Kotuso*, *Briareo* kaj *Hiheso*. La *Ciklopoj* kaj *Centimanoj* estis gigantoj, sed malbelaj, malbeformaj kaj kun tre malbonaj ecoj; la unuaj geidoj estis belaj. La *Ciklopoj* havis nur unu okulon en la centro de la frunto; la *Centimanoj* havis kvindek kapojn kaj cent brakojn, kaj ĉiuj estis brutaj, kruelaj, sovaĝaj.

Uranuso, timante aŭ abomenante tiujn monstrojn, malliberigis ilin en la *Tartaro*, kiu estis abismo neniam lumigita de la suno, kaj saman sorton estus decidonta *Uranuso* por la ceteraj fratoj, se la patrino, ju pli amantema al la idoj des pli kruela por la edzo, ne estus kaŭzinta lian ruinon: *Titeo* alvokis *Saturnon*, kaj ŝi konvinkis lin pri la celo de la patro por malliberigi lin kaj liajn gefratojn same, kiel antaŭe la patro malliberigis la monstrojn, kaj ŝi instigis *Saturnon* al ribelo kontraŭ la patro eĉ por ĉi tiun mortigi, donante al *Saturno* la falĉilon kun kiu li aperas en la pentraĵoj kaj statuoj. *Saturno* kripligis sian patron, fortranĉante lian kapablon por naski, kaj tial *Uranuso* ĉesis esti la supera genio. Alimaniere: la *Tempo* anstataŭis la *Ĉielon* entronigante la imperion de l' *Limhavo*. La sango de *Uranuso*, falinte sur *Titeon*, naskis lastajn idojn: *Gigantojn* kaj *Furiojn*, kaj ankaŭ la sango, kiu falis en la maron, naskis *Venuson Afroditan*, tiel nomata ĉar si eliris el la mara ŝaŭmo. Ĉi historion oni povas konsideri: Unue; post *Ĥaoso* venas la kreado de la ĉielo kun ĝiaj astroj, naskante la *Teron*, pro kio aperas raso el sovaĝaj homoj, sed iuj el ili bonaj — *Titanoj* — kaj aliaj malbonaj — *Ciklopoj* kaj *Centimanoj*. Dume, konsumiĝas la kreantema forto de la ĉielo, kiun anstataŭas tiu de la homo aŭ de la tempo, kiu per la fero devigas *Teron* liveri ĉion necesan; la *Titanoj*, *Gigantoj* kaj *Furioj* naskiĝas samtempe kiam la unuaj elementoj de civilizo.

Due; *Uranuso* estis la unua reĝo de la afrikaj popoloj loĝantaj parte ĉe la deklivoj de la monto *Atlas'o*, kaj la unua kiu kunigis ilin en *Klanoj* kaj ĉesigis ilian sovaĝan vivon ĉe la ar-

baroj, civilizante ilin per siaj konoj pri terkulturo kaj artoj; instruante ilin mezuri la tempon per la iradoj de la suno kaj de la luno laŭ jaro kaj monato, starigante la limojn de la sezonoj, instruante ilin kulturi la teron laŭ postuloj de ilia vivo. Tiom da konoj tiel variaj; tiom da elpensadoj, mirigis la popolon, kiun *Uranuso* rekrutis en la arbara soleco, kaj tiel, la popolo obeis lin dumvive kaj adoradis lin post lia morto, kaj per lia nomo la popolo nomis la ĉielan arkaĵon kaj lin konsideris patro de ĉiuj dioj.

(*Daŭrigota.*)



IO PRI LA TUTMONDFAMA POETO PETRARCA

Iam la pape Inocencio VI.^a, por aligi al sia partio la faman poeton Petrarca, faris al li tentantajn proponojn, kiujn la poeto rifuzis per belega letero plena je indeco diranta:

«Mi ne volas ion; mi estas kontenta, mi metis barilon al miaj deziroj, mi havas ĉion, kion mi bezonas por vivi. *Cincinato*, *Curio*, *Fabricio*, *Regulo*, subpremite tute naciojn kaj tre-ninte reĝojn post siaj triumfaj ĉaroj, ne estis tiel riĉaj, kiel mi. Se mi malfermus la pordon de mia koro al pasioj, mi ĉiam estus malriĉa: la avaremo, la volupto kaj la ambicio ne havas limojn; super ĉio la avaremo estas abismo sen fundo. Mi havas vestojn, por min vesti; manĝotaĵojn, por min nutri; ĉevalojn, por vojaĝi, kaj terpecon, sur kiun mi povas min kuŝigi, promeni kaj en kiun oni entombigos mian korpon post la morto. Ĉu, eble, iu roma imperiestro havis pli? Mia korpo estas sana kaj dresita de la laboro, kaj ĝi ne ribeliĝas kontraŭ la animo; mi havas ĉiajn librojn, kaj ĉi tiuj estas mia trezoro nutranta mian animon volupte kaj sen enuo. Mi havas amikojn, kiujn mi estimas kiel plej grandan bienon kiam iliaj konsiloj ne celas rabi al mi mian liberecon. Kromtio, sciu, ke mi vivas trankvile kaj ke nur estas malamikoj miaj tiuj, kiuj envias min; sed, vere, mi ne atentis ilin, kaj mi bedaŭrus se ili ne ekzistus. Ankaŭ mi kalkulas, kiel riĉaĵon mian, la estimon de ĉiuj honoraj homoj ekzistantaj en la mondo, eĉ de tiuj, kiujn mi neniam vidis kaj certe mi neniam vidos. Mi ja scias, ke por vi estas senvaloraj ĉi tiuj

aĵoj, ke vi ne atentis ilin. Kion vi volas, do, ke mi faru por riĉiĝi? Ĉu ke mi pruntedonu monon laŭ alta interezo, ke mi entreprenu maran komercadon, ke mi kriadu en la forumo, ke mi vendu mian parolon kaj mian plumon, ke mi avide amasigu trezorojn, kiujn mi maltrankvile gardus, kiujn mi forlasus kun ĉagreno je la morto kaj kiujn alia malŝparus ĝoje post mia morto? Ĉu estas ĉi tio, kion vi postulas al mi? Mi min konscias sufiĉe riĉa. Ĉu estas necese, ke la ceteraj konsideru min tia? Alimaniere, ĉi tio estas afero ekskluzive mia. Ĉu ni petas iam la fremdan opinion por nin nutri? Konservu por vi mem vian pensmanieron, kaj lasu al mi mian; mi havas ĝin staranta firme sur masiva bazo kaj nenio trafos faligi ĝin.*

FLUGANTAJ FOLIOJ

Dialogo pri la virino.

Mi ne kredas pri spirtismo; sed antaŭ iuj noktoj, legante, verŝajne mi aŭdis konversacion inter spiritoj. Mi forlasis la libron kaj aŭskultis. La parolantoj estis spiritoj superegaj, de famaj homoj dumvive kaj ankoraŭ por mi. Ili parolis pri la virino kaj estis tre interesaj iliaj opinioj, kaj tia grade, ke mi kopiis ilin.

Mi aŭdis unue la parolon de *Beaumarchais*, ĉar tiel alnomis lin la aliaj sin turnante al li:

—La virino estas malgranda besto, milda kaj danĝera; duone kaprico, duone rezono; ŝi estas aro harmonia entenanta multenombrajn malakordojn.

—Ne!—protestante diris *Saint Foix*—. La virino havas rideton, por ĉiaj ĝojoj; larmon, por ĉiaj doloroj; konsolon, por ĉiaj malfeliĉaĵoj; senkulpigon, por ĉiaj pekoj; peton, por ĉiaj malbonsortoj, kaj esperon por ĉiuj koroj.

—Kion vi opinias, *Larcher*?—demandis *Beaumarchais*, ridante. Kaj *Larcher*, ankaŭ ridante, respondis:

—La virino estas sanktulino en la preĝejo; anĝelo, en la strato; diablo, en la hejmo; besto, ĉe la fenestro; papago, en la pordo de la domo, kaj kaprino, en la ĝardeno.

Ridegado eksplodis, kaj kiam silento fariĝis, la milda voĉo

de pastro *Arolas* aŭdiĝis, la delikata poeto diris hispane la ĵenan latinam epigramon:

—La polvo estas pli malpeza, ol la plumo; la venteto pli ol la polvo; la virino pli, ol la venteto kaj la plumo...; kaj pli malpeza ol la virino, al mi estas nenio.

—Jes—diris la filologo *Bescherelle*—, la virino estas miksaĵo el saĝeco kaj senprudento, el virto kaj peko, el boneco kaj kolerio, el ambicio kaj sindonemo, el malforteco kaj forteco.

—Ho!—murmuris *Desnoyers*—. La virino estas la lasta iluzio, kiun oni perdas; la lasta feliĉo enuiganta la animon; la lasta pasio eliranta el la brusto kaj la lasta ebriiĝo, kiun malaperigi oni trafas.

—He, he, he!—grumblis *Molière*—. La virino estas besto, kaŭze de kiu ĉion oni faras.

Ludoviko Vives, eminenta hispana filozofo (de Valencio), konsentis pri la opinio de la fama treatroverkisto franca, dirante:

—Granda vero estas tio, kara *Molière*. La tutan bonon kaj la tutan malbonon, kiujn oni faras en la mondo, tute certe, ni ŝuldas al la virino.

—La virino—konstatis *Lessing*—estas la ĉefverko de la Universo!

—Jes; sed estas la ekzekutistino de la homa prudento—konstatis *Lamède*.

—Pri virinoj oni povas diri same, kiel pri pasioj: ĉiam oni plendas pri ili; sed ĉiam denove oni aliros al ili—diris *Jony*.

Kaj *Desnoyer* interrompis, dirante: —Okazas, ke virino povas esti malbela, ĝiba, malsaĝa, malvirtema, sed neniam ŝi estas ridinda.

Kun ironia ridego jesis *Dufresnis*: —La virinoj estas gentilaj birdoj ŝangantaj sian plumaron du-tri fojojn ĉiutage; frivolaj pro inklino, forgesemaj pro temperamento, fortaj pro la longo.

—Estas la virino al la viro la plej granda al la bonoj kaj samtempe la plej granda malbono—ekkriis *Lope de Vega*.

Kaj *Diderot* aldonis: —La virinoj estas belaj same, kiel la seraĵoj de *Klopstok*; sed teruraj, kiel la demonoj de *Milton*.

—Ĉu belaj la virinoj—malafable grumblis *Schopenhauer*—. Estis nepre necese ke la intelekto de la viro malheliĝu pro amo por juĝi bela tiun estaĵon malaltkreska, kun mallarĝaj ŝultroj, kun larĝaj koksoj, kun mallongaj kruroj. La virina beleco kuŝas

ĉe l' instinkto de l' amo, kiu puŝas nin en ŝin. Anstataŭ bela, oni devis nomi la virinon «senestetika».

—Silentu, malsaĝa maljunulo—kriis spirito de nekonato—. Tio, kion vi diris estas blasfemo. Post Dio, la virino.

Napoleono, la militistaĉo, tondre diris: —Kiom da malsaĝaĵoj vi diras! La virino ne havas kategorion.

—La virino estas kvazaŭ terpeco, en kiun la viro povas semi laŭ sia volo—sentence diris *Mahometo*.

La voĉo de *Quevedo*, je ĉi tiu momento, aŭdigis tre malĝentilan frazon hontigantan.

Estis momenta silento kaj tuj kvazaŭ zumado de flugiloj aŭdiĝis. Poste mi aŭdis:

—Jen *Shiller*...

Aŭdiĝis, kvazaŭ kanto, la paroloj de la granda germana poeto: —Honoru la virinojn! La virinoj semas ĉielajn rozojn sur la vojeto de la vivo; la virinoj faras la feliĉigajn ligilojn de l' amo kaj, sub la honesta vualo de siaj gracioj, ili nutras per sankta mano la senmortan fforon de la noblaj sentemoj.

Post ĉi paroloj, neniuj spiritoj plu. La silento estis absoluta. Mi malfermis denove la libron por daŭrigi la legadon kaj mi rimarkis la jenan apologon de *Pierre Infernal*:

Plaĉas al mi ja la virino bruna,
ankaŭ la virin' kun hararo suna.

La vizaĝoj de ambaŭ, miaj ŝatoj.


Konsekvenco:

¡Nigraj estas dum nokte ĉiuj katoj!

—Kiom da viroj forgesas, ke ili havis patrinon!—mi ekkriis, kaj mi daŭrigis la legadon.

Hispane verkis:

Miguel R. Seisdedos.



«LA INTERLIGILO DE L' P. T. T.»

La oficiala organo de la Poŝtistoj kaj Telegrafistoj, de la monata januaro aperas tute allogante per sia belega granda formata, per siaj ilustritaĵoj kaj per sia enhavo riĉa, bonstila kaj inte-


resa. Laŭdojn meritas la gvidantoj de la aboninda gazeto, kaj same Poŝtistoj kiel Telegrafistoj devas ĝin aboni, ĉar nepra devo ilia estas subteni la gazeton honorantan ilin. Aliĝu al la Internacia Ligo de la Esperantista Poŝt-kaj-Telegraf-Oficistaro (I. L. E. P. T. O.); sendu 4 sv. fr. aŭ unu dolaron al la legad-ministranto S-ro Petro Filliatre (54 rue Custine.-París, XVIII. Francia).

PRI NIAJ BILDOJ

SAN JUAN DE LA PEÑA. — S. JOHANO DE LA ŜTONO.

Tradicio.

Je la komenco de la VIII^a jarcento, kiam la maŭroj invadis Hispanujon, loĝis en Zaragoza du fratoj nomataj *Voto* kaj *Felikso*, junaj altrangaj kavaliroj, famaj pro siaj riĉaĵoj kaj pli ankoraŭ pro siaj virtoj. *Voto* tre ŝatis la ĉasadon. Tagon, persekutante cervon proksime de *Jaca* (Ĥaka), ĉe la Pireneo, li alvenis al kruta monto, kies supro estas sufiĉe vasta ebenaĵo, kaj daŭrigis la persekutadon en la limon de l' monto en kiun la cervo malaperis subite, dum lia ĉevalo pli rapide galopadis; sed jen ĝi ĉe l' bordo de rektranĉaĵo al granda abismo, kaj *Voto*, konsciante la ekpereon, alvokis Sanktan Johanon la Baptinton al sia savo, per granda fervoro, kaj pro miriganta kaŭzo, mirakle, la ĉevalo restis altenata de siaj postaj hufoj ĉe la abismorando, kvazaŭ dupiede starante. La junulo saltis teren kaj falis genuen, preĝante longtempe. *Voto*, dezirante konscii plene pri la danĝero, el kiu certe lin savis la Sanktulo, kaj scivoleme pri la sorto al cervo, li eltranĉis per sia spado la branĉaron, kiu baris al li la vojon flanken, ĝis kiam li trovis mallarĝan vojeton kvazaŭ de sovaĝaj be-toj; kaj ĉi tiun surirante, li trafis ŝprucantan fonton ĉe la piedo de altega vertikalantranĉita ŝtonego kaj apud enirejo al vasta mistera groto lin altiranta. *Voto* rigardis de la fundo la abismon, kaj, rimarkinte la frakasitan cervon, ekstremis. La junulo eniris en la groton kaj miregis, ĉar kontraŭ li staris simpla kruda altaro, al kiu li aliris por repreĝi, sed tiam li rimarkis kuŝanton verŝajne mortinton, ricevante fortan impreson; kaj, re-



Klaüstro de la Monañejo.

preĝinte, li, plibone vidante ĉe la duonhelo de la groto, rimarkis la serenajn vizaĝojn de la kuŝanto esprimantan eĉ nedifineblan ĝuon, kaj, kaptite de allogo kaj scivolemo, li levis la kapon de la respektindega maljunulo kaj, sur la ŝtono, kvazaŭ lia kapkuseno, li legis gravuraĵojn dirantaj: «Mi Johano de Atarés, estas la fondinto de ĉi preĝejo kaj ĝia unua loĝanto, kaj mi ĝin dediĉis al Sankta Johano la Baptinto. Mi vivadis longedaŭre ĉe ĉi izolejo kaj nun mi ripozas apud la Eternulo. Amen.»

Voto kredis aŭskulti voĉon el ĉielo konsilantan lin imiti la vivon de la mortinto. Li enterigis ĉi tiun, kaj tuj li ekiris al Zaragozo; alveninte ĉi tie, li konigis la okazintaĵojn al sia frato kaj sian decidon imiti Johanon de Atarés. La fratoj liberigis siajn sklavojn, d'ŝdonis siajn riĉaĵojn al malfeliĉuloj kaj iris sin izoligi en la ermitejon apud la tombo de la maljunulo.

La tradicio konstatas, ke la demonoj konstante tentis la fratojn, sed ĉi tiuj venkis la tentoj, kaj la sankteco kaj scienco de la asketoj disvastiĝis de monto al monto, kaj el ĉie alkuris al la groto multenombraj personoj por peti konsilojn. La ermitejo, la groto, ankaŭ fariĝis rifuĝejo por la kristanoj forkurantaj el la mahometanoj.

Tagon, tricent viroj palaj, preskaŭ nudaj, terurigitaj kaj sangilverŝantaj preskaŭ ĉiuj, subite eniris la groton, ili forkuris el la supro de la ŝtonego. Sur ĉi supraĵo preskaŭ plata, sufiĉe vasta, malfacile suprenirebla kaj bone kasita, la forkurintoj starigis urbeton *Pano'n*, sed la ruza maŭra militestro *Muza* seĝis pri la rifuĝejo kaj ordonis, ke la kruela *Ayud* (*Ajud*) kun maŭra korpuso ĝin surprizu kaj detruu.

El la groto eliris la kuraĝaj aragonanoj por realmiliti la landon je dato pli frua ol tiu de Covadonga. Pro konsilo de *Voto* kaj *Felikso*, ili decidis kavaliron *Garci-Jiménez* estro, ĉar kvankam estis aliaj pli nobelaj, li estis multe pli energia kaj kapabla por la komando. Ili invadis la valojn kaj rapide venkis kaj venkadis la mahometanojn.

Voto kaj *Felikso* mortis maljunaj kaj sanktaj. Ilin imitis multenombraj aliaj. Iujn jarojn poste, la reĝo *Fortun Garcés* stariĝis preĝejon ĉe la groto mem, kaj je 1023, franca monaĥo, nomata *Paterno*, donis al asketoj de Sankta Johano la regularon de la monaĥoj de *Cluni*, tiun de *Sankta Benito*.

Julio Mangada Rosenörn.

ACTA XX

En Madrid, a 15 de Abril de 1930, en el domicilio social de la Sociedad Española Esperantista, Sagasta, 10, se reunió el Comité Ejecutivo de la Directiva para tratar asuntos corrientes y revisar las Actas y el Protocolo del Congreso de Oviedo, y después de un cambio de opiniones sobre la marcha progresiva de nuestra Sociedad, se procedió a tratar de los asuntos siguientes: Lectura del Acta de la reunión anterior, que fué aprobada; quedaron aceptados e incorporados a la Directiva los nuevos Vocales de Aragón; se leyó y desaprobó una carta del señor Maynar en la que no reconocía la validez de lo actuado por los H. E. A.-anos de Aragón; se acordó comunicar a los Vocales regionales el nombramiento de los nuevos colegas; se aprobaron las respuestas dadas a las preguntas de la Federación Catalana sobre su ingreso en H. E. A.; se insistió en la conveniencia de celebrar en Zaragoza el IX Congreso Nacional de Esperanto; no se quiso tomar en consideración el proyecto del señor Maynar; se leyó una carta del señor Carnicer, nuevo Vocal de Aragón, y se alabaron los notables trabajos que su Grupo viene realizando en bien de Aragón, de la H. E. A. y del ideal común; se convino en publicar en la revista el Acta XIX, y una nota citando a todos los Vocales regionales para el día 27 de Mayo; se ponderó con aplauso el notable desarrollo que va adquiriendo nuestra Sociedad; y no habiendo más tiempo para tratar todos los asuntos, se levantó la sesión a las veinte.— V.º B.º: *El Presidente accidental*, JOSÉ PEROGORDO.—*El Secretario*, MARIANO MOJADO.

* * *

ACTA XXI

En Madrid, a 27 de Mayo de 1930, en el domicilio social de la Sociedad Española Esperantista, Sagasta, 10, se reunió el Comité Director o Directiva de la misma, que había sido convocada por primera vez, a instancias de D. Manuel Maynar, para tratar de los asuntos siguientes, y otros que pudieran presentarse desde su convocatoria: 1.º Lectura del Acta de la reunión anterior; 2.º Informe del Inspector de Instrucción Pública y carta del señor Ministro de Estado; 3.º Si ha de convocarse la

